

Paulo Silas (Brazilo)



Okazas

Trans la universo, io ekzistas.
Sed la universo okazas:
grandioza amaso da lumaj punktoj.
Ekzistas punkto, kiu nomiĝas Lakta Vojo.
Sed la sunsistemo okazas:
ege liĝiĝo inter buloj rondirantaj lumon.
La Tero ekzistas de multe da tempo.
Sed la homo okazis kaj okazas provizore:
moviĝanta materio kiu pompas pro eta mola
 pasto,
ene de dura strukturo,
kiu ekzistas kiel kranio.
Sed la pensoj, la rezono, la kompreno, la
 interpretoj
okazas kaze de cirkonstancoj.
Kio okazos al la ekzistanta esto,
ekzistanta homaro,
kiam ĉio estos resto de nebula pasinteco?

2016-02-01

Maria Nazaré Laroça (Brazilo)



Hastema

Ja, mi hastas pli ol tempo.
Kia stultaj'! — oni diros.
Sed mi volas esti river',
kiu kuraĝe pluiras,
feliĉa, ĉirkaŭfluante
trompajn ŝtonojn de la vojo.

Kaj dum la vana kurado,
la horloĝo min transpasas...
Tiam ostaĝ' de laceco
por irigi min, freneza,
mi provas verki poemon,
sed ankoraŭ mi fiaskas.



Juiz de Fora, 13/06/2018.

Simpleco

La poeto paŝtas sungutojn
en ĉi vintra mateno,
kaj pelas ribelemajn ideojn
sentojn serĉantajn.

Tiam lin surprizas Dio
per la nobleco de etetaj
floretoj blankaj,
kiuj ornamas la polvon
indiferentan de l' forlasita
trotuaro.

Juiz de Fora, 23/06/2018.

Interludo

Blov' el silent',
nubmuziko;
anim' ĝojplena

kvietiĝas.

Juiz de Fora, 19/06/2018.

Tiberio Madonna (Italujo)



SOMERO EN LA KAMPOJ

La radioj de l' suno
kunplektiĝas
formante spikojn orajn
kiuj vestas la kampojn
per lumo.

Kaj la birdotimigilo
bronzita de la horoj
elmontras fiera sian larĝan jakon
remburitan per pajlo
kaj per pacienco.

Unu nuboj nur
ĉirkaŭvagadas tra l' bluaĵo
serĉante malvarmeton,
sed de ombro refreŝiganta
eĉ ne l' ombro.

La ruĝo de l' papavoj
kaj la lazur' de l' cejanoj
inunditaj
de l' oro de l' tritiko
aperas ĉi kaj tie
konfuzitaj.

Du flugiloj de papilio
kun zigzaga iro
estas la nura elemento
moviĝanta
de l' pejzaĝo langvora.

La torpora silento
en la temp' de la siesto
estas rompata nur
de la kantado
alterna

de du cikadoj.



Christian Cimpa (Aŭstrio)



Enlumas min senrimo

Estas mia mens' tro eta
por la nobla viv' poeta.
Mankas konoj kaj komprenoj!
El la fraz- kaj vort-fadenoj
formas mi nur lame trikon,
mistraktante la metrikon,
maltrovante muzajn rimojn.
Merd'! Mi rompas ĉiujn limojn
de l' verkista malkapablo.
Inkmakul' sur inkunablo
ĝenas, tamen pli efikan
malagrablon estetikan
mi produktas per poemo.
Nun, mi faras ne pro emo,
pli pro vi! Mi nur fuŝegas,
sed vi ja ... la fuŝon legas.

La olda raso

William Oldo versparolis
kaj aliaj kredi volis,
ke la homo estas raso
de – laŭ li – infana klaso.
Diris li: La mankoj multas,
la homar' esence stultas,
ĝi malŝatas kaj mensogas,
la malbonon ĝi allogas,
ĝi kruelas kaj tiranas.
– Sed ĉu tiel ĝi infanas?
Ne! Infanoj hele ridas,
ili ĉie ĝojon vidas!

Grandas la diferenco	malantaŭ la kurteno.	sed kreas Inferon
Inter grandanimaj riĉuloj	***	Sur la tero.
kaj etmensaj Riĉ-Nuloj.	Malsata homo	***
***	kondutas kiel lupo	Komunaj kunlaboroj
Riĉ-Nulo	sen sento de kulpo.	necesas
estas tiu riĉa ulo	***	por komunaj problemoj
kies valor' sen mono	Homaro konsistas	kaj doloroj.
estas Nulo,	el tiuj, kiuj	***
***	afable zorgas	Inter animaloj
Silento de amiko	pri aliaj uloj	en la ĝangalo
Pri malamika piko	kaj egoistoj kiuj vivas	homo estas konata
tiel doloras kiel	samkiel kuloj.	kiel ruza animalo.
piko de malamiko.	***	***
***	Homo liberas	Grandanimaj riĉuloj
Silento de	en la naturo,	kreas prosperon
paŝtista hundo	kaj mallieras en l' kaĝo	la ceteraj Riĉ-Nuloj
dum la atako de lupoj	de sia propra kulturo.	kreas mizeron.
estas nepre	***	***
perfido kaj kulpo.	Dio estas Universo	Homo sen homa moralo
***	kaj la tuta senlima universo	Pli malaltas ol animalo.
Jen tre grava	estas unu-dio-verso.	***
sed malfacila tasko	***	Tiu, kiu murdas
vivu la vivon	Kie neniu estas	nome de Moralo
laŭeble sen masko.	tro riĉa	estas la plej sovaĝa
***	kaj neniu homo	animalo.
Vivu la vivon	estas malriĉa	***
laŭ la volo	tie ĉiu homo	Tiu vivas plej prudente
de via koro,	estas feliĉa.	kiu ĉion faras
ne laŭ tiu de	***	ĝusta-momente.
l' popolo.	Sen via gardhundo	***
***	ne sidu ĉe la tablo	Jen la diferenco
Kiam	de ruza Mulaho	inter malriĉulo
tre mallumas	kaj Diablo.	kaj Riĉ-Nulo;
sunleviĝo proksimas.	***	la unua laboras
***	Estu singarda	kiel mulo
Se pri la mondaj aferoj	kontraŭ skorpiono	la dua vivas
decidus grandanimaj homoj	kaj Mullaho	kiel kulo.
homaro kune vivus	kiu kaŝas sin	***
sen gravaj problemoj.	malantaŭ Dio.	Civilizita homo
***	***	ne estas tiu, kiu
Ne gravas la aferoj	Mulaho	dancas en dancohaloj
sur politika sceno	promesas Paradizon	sed tiu, kiu estas
sed gravas tiuj	kaj parolas pri	kontraŭ maljusto,
	la sankta vero	mizer' kaj bataloj.

 En juĝejo
 ŝafo egalas al lupo
 temen la verdikto ĉiam estas;
 lupo estas sen kulpo.

 Via opinio
 pri alia ulo
 estas via spigulo.

 Ĉam kaj ĉie ekzistas
 sufiĉe da kanajloj
 kaj idiotoj

kiuj subtenas despotojn
 kontraŭ bonaj patriotoj.

 Homo
 kun alta moralo
 ne voĉdonas
 por batalo.

 Suferoj de
 milito kaj mizero
 estasla plej grandaj
 sur la tero.



&&&&&&&&&&&&&&&&

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



La vento pelas
 longkruran fraŭlinon.
 Fajregoj pro l' am'.
 *
 Plaĝo. Knabinoj.
 Petolemaj hararoj.
 Sablo aromas.
 *
 Pulsada en mi
 radioj de pasinta am'.
 Tapiŝ' uzita.
 *
 La luno teksas
 niajn pekecajn noktojn.
 Dolĉaj memoroj.

Joakimo Ringelnac

Aventuristo

„Kien aventurist', vi?“

Transversen aldanĝere,
 al song' pasinta Tere
 mil jarojn, kaj en mi.

Mi drivu iel ie,
 en mondoj videblaj al fremdul'.
 Mi volas gajni, kapti ĉie
 alion en vivmalregul'.

Ja transas ĉiam feliĉ'.
 Min logas fora trembrilo,
 min logas flustra sibilo
 al eblo nebula en niĉ'.

Antaŭan de l' posedo,
 sciatan ĝis ĉi hor',
 mi perdu post cedo.
 Vojaĝas mi tra mia propra kor'.

En la parko

Ĉe eta arbet' staris kapreolet'
 en reva beat' en kviet',
 je l' dudektria kaj du.
 Je la kvara post fest'
 mi revenis je l' fru'.

Jen plu revis starante la best'.
 Mallaŭte mi iris — sen spir' kun diskret' —
 kontraŭ la vent' ĉe l' arbet'.
 Mi tuŝis la beston scivole pri l' fiks'.
 Kaj ĝi estis el gips'.

Tradukis



Hans-Georg Kaiser
(Germanujo)

Cheng Hao (1032 - 1085)



Improvizajaĵo pri printempa tago

La brizo kaj nubetoj min ravas ĝistagmeze,
Promenas inter floroj mi laŭ river' kompleze.
Ĉi homoj mian ĝojon elkoran ne komprenas,
Prenante min por bubo vaganta tre ekscese.

Zhu Xi (1130 – 1200)



Printempa tago

Ekskursas mildan tagon mi borde de
Sishui*,
Senlime pitoreskaj pejzaĝoj novas ĉi.
Facile ja sentiĝas karesa vent' eosta,
Printempo milnuanca paradas per magi'.

*Sishui**: nomo de rivero meze de la provinco
Shandong.

Elĉinigis



Minosun (Ĉinujo)

Iilir Zhiti



Nur momenteto

Nur momenteto,
nur momenteto,
limigas nenion,
disde miraklo.

Nur momenteto,
nur momenteto,
donas nin abismon,

aŭ feliĉecon.

Nur momenteto,
nur momenteto,
dividas iluzion,
disde la vero.

Nur momenteto,
nur momenteto,
disigas morton,
disde la vivo.

Nur momenteto,
nur momenteto,
dividas militon,
disde la paco.

Nur momenteton,
nur momenteton,
distanças perdo,
disde la profito.

Nur momenteto,
nur momenteto,
dividas sukceson,
disde simpla revo.

Nur momenteto,
nur momenteto,
estos ni pro
momenteto viktimo

Tirana, julie, 2017

Vojaĝo per vespera trajno

Skuiĝas ni pro trajna balancado
kaj sentigxas vespera spirado
dum oni rigardas en senfinaj
agrokampoj
kiel laboras ankoraŭ virinoj.

Pro ilia peza laboro
mem naturo ofendiĝas
pro ilia vizaĝo nostalgias

eĉ la forlasita spegulo.

Ke ili bezonas ripozu
Ĉu oni forgesis
ke inoj krom laboro bezonu
iom da tempo por sin beligi.

Enhavante virinan penon
eĉ plej bela pejzaĝo enmonde
perdas sian brilon, ĉiun valoron
kaj vana iĝas tio sence.

Aŭdi ĉirkaŭen ie ajn
kia tristeco kaj humilo en vivo estas
ke pezan laboron en agrikulturo
Ja virinoj kaj virbovoj faras.

Longajn paroladojn kompilas
la regantoj en la ĉefurbo
pri emancipiĝo kaj virinoj
dum iliaj edzinoj en vera lukso vivas!

Lushnjë, julie 1985

Esperantigis



Bardhyl Selimi (Albanio)

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKKVARA

La movoj de la ĉielo

§14-04

Kiam Konfuceo vojaĝis okcidenten al la regno Wei, Yan Hui, unu el liaj disĉiploj, demandis la

majstron Jin, dirante:

“Kion vi pensas pri la vojaĝo de mia majstro al la regno Wei?”

“Ho ve!” diris Jin. “Via majstro falos en malfeliĉon!”

“Kial?” demandis Yan Hui.

“Antaŭ ol la pajlohundo estas oferata ĉe la ofera ceremonio, ĝi estas tenata en kesto aŭ korbo envolvita en kolore brodita tuko. Dume la ŝajniganto de la mortinto kaj la plenumanto de la oferado sin purigas kaj faras faston antaŭ ol ĝi estas prezentita kiel oferaĵo. Post la oferado ĝi tamen estas forĵetita, kaj preterpasantoj tretas ĝian kapon aŭ dorson per la piedoj, kaj herbokolektanto levas ĝin kiel brulaĵon. Se iu prenas ĝin, metas ĝin denove en keston aŭ korbon envolvitan en kolore brodita tuko kaj portas ĝin kun si la tutajn tagojn, ĉu promenante, ĉu restante hejme, ĉu kuŝante por dormo, li certe havos premsonĝojn aŭ deliriĝos de teruro.

“Nun via majstro estas preta levpreni la pajlohundon uzitan de la antikvaj suverenoj kaj kolekti siajn disĉiplojn por porti ĝin kun si, ĉu promenante, ĉu restante hejme, ĉu kuŝante por dormo. Jen kial en la regno Song la arbo, sub kiu li donis siajn prelegojn, estis dehakita; kial li iam estis elpelita el la regno Wei; kaj kial li estis alpremita al la mizerego en la landoj Shang kaj Zhou. Ĉu tiuj ĉi ne estas liaj premsonĝoj? Kiam li estis sieĝita inter la regno Chen kaj la regno Cai dum sep tagoj kaj noktoj, li havis nenion por manĝi kaj sin trovis preskaŭ ĉe la rando de la morto. Ĉu tiuj ĉi ne estas veraj teruraj sonĝoj?”

“Por veturi per akva vojo, nenio estas pli bona ol ŝipo; por vojaĝi per tera vojo nenio estas pli bona ol ĉaro. La ŝipo povas veli sur la akvo, sed, se oni puŝas ĝin sur la tero, oni neniel antaŭenigos ĝin je longa distanco dum sia tuta vivdaŭro. Ĉu la antikveco kaj la nuntempo ne estas kompareblaj kun la akvo kaj la tero, kaj la dinastio Zhou kaj la regno Lu ne kun la ŝipo kaj la ĉaro? Se via majstro deziras apliki la principojn de la dinastio Zhou al la nuna regno Lu, tio estas kiel voli vojaĝi per ŝipo puŝata sur la tero. Li vane penegas kaj mem iros al katastrofo. Ĉio tio estos ŝuldata al tio, ke li ne konas la nekonstantecon de la tradicio, kaj ke li ne scias, ke oni devas sin adapti al la ĉiam ŝanĝiganta

mondo, por eviti katastrofojn.

“Ĉu vi ne vidis la baskulan putakvo-levelon? Kiam vi ektiras ĝin, ĝi malleviĝas; kiam vi maltenas ĝin, ĝi leviĝas. Ĉar ĝi estas tirata de la homo kaj ne tiras la homon, ĝi ofendas neniun, tute egale ĉu ĝi malleviĝas aŭ leviĝas. Tial la valoro de la ritoj kaj la leĝoj starigitaj de la tri suverenoj kaj la kvin imperiestroj kuŝis ne en tio, ke ili estis similaj inter si, sed en tio, ke ili alportis bonan ordon kaj pacon al la mondo. Tial ili povas esti komparataj kun la kratagoj, piroj, oranĝoj kaj pampelmusoj, kiuj havas malsamajn gustojn, sed ĉiuj estas egale bongustaj. Same kiel ili, la ritoj kaj la leĝoj varias laŭ la tempoj.

“Nun, se vi kaptas unu simion kaj vestas ĝin per la robo de la Duko de Zhou, ĝi certe sentos sin malkomforte kaj mordos kaj ŝiros ĝin en pecojn. Laŭ mi la diferenco inter la antikveco kaj la nuntempo estas kiel tiu inter la simio kaj la Duko de Zhou.

“Iam la fama belulino Xishi, eksentante doloron ĉe la korkavo pro malsano, kuntiris siajn brovojn en la ĉeesto de siaj najbaroj. Iu malbela najbarino en ŝia vilaĝo trovis tion tre bela kaj, reveninte hejmen, provis ŝin imiti. Ŝi ĉiam kuntiris la brovojn kun la mano metita sur sia korkavo. Rezulte de tio, la riĉaj najbaroj, ekvidinte ŝin, solide fermis la pordon kaj restis hejme, kaj la malriĉaj, ekvidinte ŝin, forkuris de ŝi kun siaj familianoj. Ŝi sciis, ke la brovkuntiro de Xishi estas bela, sed ne sciis, kial ĝi estas bela. Ho ve! Via majstro falos en malfeliĉon!”

§14-05

En la aĝo de kvindek unu jaroj Konfuceo ankoraŭ ne ellernis la Taŭon. Li vojaĝis suden al la urbo Pei por viziti Laŭzi.

“Jen vi venas?” diris Laŭzi. “Mi aŭdis, ke vi estas saĝulo en la nordo. Ĉu vi jam atingis la Taŭon?”

“Ankoraŭ ne,” respondis Konfuceo.

“En kia maniero do vi serĉis ĝin?” demandis Laŭzi.

“Mi ĝin serĉis,” respondis Konfuceo, “per la studo de regularoj kaj leĝaj artikoloj. Kvin jaroj pasis, sed mi ĝin ankoraŭ ne trovis.”

“En kiu alia maniero do vi ĝin serĉis?” demandis Laŭzi.

“Poste,” respondis Konfuceo, “mi serĉis ĝin per la studo de la jino kaj la jango. Dek du jaroj pasis, sed mi ankoraŭ ne ĝin atingis.”

“Povas esti tiel. Se la Taŭo povus esti prezentata kiel donaco, ĉiu oferus ĝin al la reĝo; se la Taŭo povus esti donacita, ĉiu donacus ĝin al siaj gepatroj; se la Taŭo povus esti komunikata, ĉiu komunikus ĝin al siaj fratoj; se la Taŭo povus esti transdonita, ĉiu transdonus ĝin al siaj posteuloj. Sed ĉio ĉi tio estas neebla kaj jen la kaŭzo: se homoj ne estas pretaj akcepti la Taŭon, ĝi ne estas kun ili; se homoj ne dece kondutas, ĝi ne povas esti praktikata. Se tio, kio venas el interne, ne estas akceptita ekstere, la saĝulo ne rivelos ĝin; se tio, kio venas el ekstere, ne estas akceptita interne, la saĝulo ne tenos ĝin en la koro.

“La famo estas kiel publika vazo, el kiu oni ne devas preni tro multe. La humaneco kaj la justeco estas kiel provizoraj restadejoj de la antikvaj suverenoj, en kiuj oni ne devas loĝi pli ol unu nokton. Pli longa restado provokos multe da riproĉoj.

“La perfektaj homoj en la antikveco prenis la humanecon kiel portempan agmanieron kaj uzis la justecon kiel portempan loĝejon, sekve ili povis vojaĝi en la mondo de absoluta libereco. Ili nutris sin per neintensa terkulturado kaj vivis memsufiĉan vivon. Tiuj, kiuj vivas absolute libere, estas en senagado; tiuj, kiuj nutras sin per neintensa terkulturado, estas facile kontentigitaj; tiuj, kiuj vivas memsufiĉan vivon, donas nenion kaj prenas nenion. La antikvuloj konsideris tiujn kiel vojaĝantojn por serĉi la veran naturon.”

“Tiuj, kiuj rigardas kiel pravigeblan celon la akiron de la riĉaĵoj, ne forlasas sian salajron; tiuj, kiuj rigardas kiel pravigeblan celon la ĉasadon de la reputacio, ne forlasas sian bonan famon; tiuj, kiuj sin alkroĉas al la potenco, rifuzas forlasi sian pozicion. Kiam ili tenas tiujn ĉi aferojn en siaj manoj, ili vivas en maltrankvilo kaj timo; post kiam ili perdis tiujn ĉi aferojn, ili vivas en malĝojo kaj ĉagreno. Havante nenian koncepton pri eventuala katastrofa sekvo, ili fiksas sian rigardon sur tio, kion ili senĉese ĉasas. Ili ja meritas esti kondamnitaj de la ĉielo. Malpardono kaj dankemo, dono kaj preno, konsilo kaj instruo, vivo kaj morto — tiuj ĉi ok estas la instrumentoj de la regado. Nur tiuj, kiuj sekvas la evoluon de la mondo

kaj senĉese sin adaptas al la ŝanĝiĝado de la vivo, povas bone utiligi ilin. Tial, kiel estas dirite, ‘Nur tiuj, kiuj estas korektitaj, povas korekti aliajn.’ Troviĝas nenia pordo de la ĉielo malfermita al tiuj, kiuj ne kredas tion ĉi.”

Elĉinigris



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbujo)



Sentitole

—laŭ ĉinesko sopir-al-sudo*

Soife

ŝi vortojn sorbas
viajn. Neforgeseblaj.
La hararon ŝi tondas
se al vi plaĉas.

Tre longe
kunvivadis ni.
Zorgeme flegas unu
la alian. Kredas vi
en homaro ĉi.

Amikec’
samkiel aer’
bezonata al homoj
akvo al rozoj kaj ter’.
Amo vera ver’.

Pacigi
homojn eblas, ĉu?
Diversmaniere. Jes.
Glavojn ne krucigu plu.
Militojn haltu.

Parolu,
interkonsentu,
protektu la popolon,
ĉiam kaj ĉie. Sentu
amon. Ne pentu!

Sentitole

—laŭ ĉinesko sopir-al-sudo*

Griziĝas
ĉiel’. Fulmetoj
el malproksimo tondre
eĥas. Kurtaj pluvetoj
antaŭ ŝtormetoj.

Kverado
de turtoj milde
niajn korojn influas.
Fulmoj kvazaŭ surbilde
ekas rapide.

Depost pluv’
videblas klara,
multkolora ĉielark’.
Koncerto birdara ĉe
Petro kaj Mara.

Subbrake
ŝi tenas forte
lin. Ridanta mieno
ampromeso senvorte.
Certe, ĝismorte.

Odoras
freŝe naturo.
Ne plu soifas tero.
Brilas verda valmuro
de Rtanj** turo.

***Rtanj -montego troviĝanta en la orienta parto de
Serbio de kie videblas duono de Serbio*

Al kara Saliko

—laŭ ĉinesko sopir-al-sudo*

Gajigas
mian koron vi.
Letera interŝanĝo.
Malproksime loĝas vi.
Mia kara, ci.

Mi skribis
pli detale pri
ĉiutaga vivo, pri
mialanda histori'.
Vi pri famili'.

Leteroj
flugas al via
unika, fabela urb',
de suda lando, mia,
kara Serbia.

Malbela
temp'. Mizera. Fi
lando bombado. Sekvis
suferoj. Animoj pli
ne plu elteni.

Via ec',
Homa egalec',
profunde en mi restis.
Solidara amikec'...
Vivu humanec'!

**Sopir-al-sudo* (ĉine: *Yijiangnan*): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo *xa,xa,a* (*x=senrima*).

Li Yu (937-978)



Nostalgio

— Laŭ ĉinesko *Xiangjianhuan**

Mute surturen un'.
L' arka lun'.
Sola l'omok' en kort' sub aŭtun'.

Nostalg',
en seri':
la kor' nun
sentas, malorde, guston iun.

Noto: La vorto 'omoko' (de la korea lingvo, el ĉina origino) signifas altan kaj valoran arbon de *Firmiana platanifolia* (ekz. sterkulio) aŭ foje ankaŭ de *Paulownia fortunei* (paŭlivnio), sur kiuj ofte sidas fenikso (la plej bela kaj nobla birdo).

**Xiangjianhuan*: unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strofoj de tri kaj kvar versoj respektive el 6, 3, 9; / 3, 3; 3, 9 silaboj, laŭ rimaranĝo *aaa,bb,aa*

Pluvado

— Laŭ melodio *Langtaosha*

(Verskadro: 5a|4a|7a|7b|4a||5a|4a|7a|7c|4a)

Pluvas ekster kurten' lirlante,
primavero fadante.
Peplom' ne blokas nokt-finan fridon
tra-vande;
dum mi, ne konante min kiel fremdulon nur,
ĝojis tempe songante.

Kial sole staras verande
mi sen vido translande?
Tio facile foriras, ne revenante.
Pasas printemp' kun falintaj floroj en la flu'
ĝis nenien mondrande.

(Tradukita sub-ĉineske, per silabeco 1:1.5.)

Hela Luno

— Laŭ melodio *Yumeiren*

(Verskadro: 7a|5a|7b|9b||7c|5c|7d|9d)

Printempaj floroj kaj l' aŭtuna lun', senfine:
Kiom da aferoj pasinte!!
Preter l' dom' lastnokte l' eosta vent'
revenas;
Sub la lun' repensi pri l' propra land' mi ne

eltenas.

Restus kun jad' kaj orkideoj l' konstruaĵo;
Ŝanĝiĝas nur l' ruĝa vizaĝo.

Vi ne povas suferi: do, kiom da malĝoj'?—
Kvazaŭ fluadanta al la maro l' primavera
roj'!

(Traduko farita sub-ĉineske, per silabeco
S×2-1[S=sinogramoj]; tamen la fina verso 9-sinograma en
ambaŭ strofoj ne estu 9×2-1=17, sed estu nur 15 silaboj—jam la
maksimuma longeco de verso!)

Tradukis



Licius (Ĉinujo)

Aleksandr Starostin

Kino

En mia infaneco kino estis granda evento. Novaĵo pri tio, ke estos kino, disvastiĝis kun tia rapido, kun kia kuris knaboj en nia vilaĝo en Moskva regiono. Tiu evento devigis min saltante pro ĝojo kuregi al plej proksima najbaro Vovka.

– Vovka! Vovka! – mi kriis.

Vovka elŝovis sin el fenestro.

– Hodiaŭ estos kino! – mi informis.

Kapo de Vovka malaperis. Li loĝis en multeloĝeja domo, kaj mi sciis, ke post dek sekundoj ĉiuj loĝantoj de la domo ekscios pri tiu novaĵo. Mi estis fiera pro tio, ke mi estas unua, kiu informis pri kino. Poste mi iris al hejmo. Mi devis montri al gepatroj mian bonan konduton. Afero estis en tio, ke mi plej multe ŝatis promeni. Ĉiu tago okazis tia dialogo:

– Panjo, ĉu vi permesas al mi promeni?

– Mia Dio! Kiam promenoj tedos al vi? Iru, sed promenu ne longe.

Mi startegis kaj kuris al amikoj. Mi promenis pasie, plene ne observis tempon. Oni povis rompi mian promenon nur per helpo de forto. Tial, kiam venis krepusko, panjo serĉis min laŭ vilaĝo. En

dekstra mano ŝi tenis ion, kio similis ledzonon. Kun granda malplezuro mi devis reveni hejmen.

Sed nun tia frua apero tuj ekscitis suspekton, kaj panjo demandis:

– Kien vi volas iri?

– Panjo, donu monon, hodiaŭ estos kino.

Estas mirinde, sed panjo neniam rifuzis. Ŝi nur parolis, ke mi ne iru reen sole sed kun amikoj.

Klubejo, en kiu oni montris filmojn, estis sufiĉe malproksime. Oni devis trairi tutan vilaĝon kaj transiri fervoja linio Moskvo-Savjolovo trans subtera transirejo, kiun oni ial nomis “tubeton”. Tiu transirejo estis ne sendanĝera. En ĝi oni povis rabi. Ankaŭ ĝi ĉiam estis malhela, kvankam oni tie pendigis lampetojn, la aliaj rompis ilin. Sur mala flanko de la linio estis brika uzino, kaj tie loĝis laŭ diro de mia patrino “huligana-bandita loĝantaro”, kun kiu ni konstante pugnobatalis. Sed en tago, kiam oni montris filmon, aŭtomate aranĝiĝis militpaŭzo. Ĉiuj spektantoj venis antaŭ du horo antaŭ komenco de prezento kaj lokiĝis apud la klubejo tiel, por ke ili povu vidi proceson de preparo al monro de filmo. Informo venis kun reguleco kaj precizeco de militaj resumoj. Mi ne komprenas kiel, sed ajna novaĵo tuj iĝis konata por ĉiuj kaj peneme preparoliĝis – kiu hodiaŭ estos filmo: aŭ kvara serio de “Tarzan”, aŭ “Puna placeto”. Klariĝis, ke estos “Tarzan” el dek du partoj, sed oni alveturigis nur ok partojn, pro la ceteraj aŭto jam veturis. El okaj partoj oni ankoraŭ ne revolvis duonon, kaj nun oni petos iun el spektantoj helpi revolvi. Tiu laboro estis respondeca, por tio oni



Ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova

devis havi spertlertecon. Speciala stablo por revolvido de filmostrio oni devis turni tiel, por ke ne ŝiru ĝin kaj samtempe metu filmostrion streĉe. Apud muro de

klubejo ekstere oni ekfunkciigis motoron, kiu provizis per kurento filmoaparaton. Sono de ĝi estis kiel de mitralo, sed por kolektiĝintoj la sono estis dezirata muziko, se ĝi komencis funkcii, do ĉio estos bone – kino estos. Priparolado de tiuj detaloj estis agrabla preludo al komenco de filmo. Tio estis feliĉaj minutoj de mia vivo. Kaj jen venis longe atendita momento – el klubejo eliris homo kun biletoj kaj iris al budo kun malgranda fenestro. Ĉiuj saltleviĝis kaj kuris al la budo. Fariĝis grandega amaso. Komenciĝis interpuŝo. Homoj, kiuj ricevis biletojn, ne povis deiri de la kaso, amaso puŝis. Huliganoj kun sperto en tiu interpuŝo ne partoprenis. Ili elektis malgrandan knabon de ne alta staturato, balancis lin tenante je manoj kaj piedoj kaj ĵetis lin sur kapojn de amaso. La knabo laŭ kapoj atingis la kason, prenis biletojn kaj per sama vojo revenis. Tiu malordo daŭris dum duonhoron. Mi ĉiam miris, por kio oni aranĝis tian batalon, ja organizantoj ne indikis lokojn sur biletoj kaj vendis ilin tiom, kiom spektantoj aĉetos. Verŝajne tio estis anstataŭ pugnobatalo. Ja oni devis ien ellasi akumulitan energion. Mi ĉiam aĉetis bileton relative trankvile, fine, kiam apud la kaso restis kelkaj homoj. Bileto estis ĉielblua kvadrateto el kartono kun ia sigelo kaj subskribo de kasisto, spektanto tuj redonis ĝin al tralasanta al klubejo biletisto. Biletisto ne ŝiris biletojn, ilin oni uzis multfoje.

La klubejo estis longa griza traba domo kun ia pala afiŝo apud enirejo. Interne estis unu ejo tute plenigita per lignaj benkoj, kiujn oni alnajlis al planko. Ĉiuj muroj estis kovritaj per sloganoj kaj afiŝoj. Meze laŭ tuta plafono estis fleksita solivo. Al mi ĉiam ŝajnis, ke ĝi tuj rompiĝos, kaj plafono falos sur kapojn de spektantoj. Antaŭe sub plafono pendis ekrano. Ĝi estis kudrita el kelkaj litotukoj kaj ofte flikita. Dum prezento knaboj pafis al ĝi per memfaritaj infanaj pistoloj kaj ĵetis ĉion, kion estis en manoj, al malbonaguloj, malamikoj kaj banditoj. Tiam kinon oni akceptis ne kiel filmostrion kaj scenetojn sed reale okazantajn eventojn.

Halo tute pleniĝis. Post tiu oni enlasis malgrandajn knabojn de kvin-sep jaroj. Ili trapenetris al ekrano, sidis sur planko je dorso al muro kaj rigardis ekranon de inversa flanko trae. Ili sidis je

duonmetro de ĝi, kion ili vidis? Unua vico ankaŭ sidis je metro de ekrano, oni devis spekti levinte kapon supren. Lastaj vicoj lokiĝis ĉirkaŭ filmoaparaton, kiu estis apartigita de la halo per ŝirmilo. Mi ne ŝatis sidi – malsupra parto de ekrano estis ne videbla pro kapoj de spektantoj. Ĝenerale estis malvaste, oni puŝis. Krom tio la fleksita solivo al mi ne plaĉis. Post muro de klubejo krakis la motoro, en la halo ĉirpis filmoaparato, sed tio malhelpis neniun. Halo plenigita per emocioj skuis malnovan klubejon. Ĝenerale monro de filmo estis terura. Ŝiriĝis filmostrio, aŭ ĝi enŝtopiĝis en filmoaparato, haltis kaj fandiĝis pro forta lampo, kaj en ĝi aperis truo. Oni miksis partojn kaj montris finon de iuj eventoj sed poste ilia komencon. Aŭ oni komencis montri nerevolvitan filmostrion, kaj ĉio sur ĝi moviĝis reen.

– Botistoj! Botistoj! – halo kriis kaj piedbatis.

Ĉio haltis kaj oni komencis revolvaron de filmostrio. Tio estis ordinara, neniun pensis, ke oni devas montri filmon iel alie. Kun tiuj haltoj filmo daŭris longe. Kiam ĝi finiĝis, jam venis krepusko. El klubejo eliris amaso, kiu similis furiozajn frenezulojn. Svingante manojn kaj piedojn, ne aŭskultante unu la alian knaboj rerakontis unu la alian epizodojn de filmo. Kino finiĝis... Ne, ĝi ne finiĝis, ĝi daŭris en niaj kapoj, emocioj plenigis animon kaj koron. Ĉiuj, kaj mi, sentis sin kiel herooj de filmo. Ni estis feliĉaj kaj certaj, ke bono, kuraĝo kaj scipovo ĉiam venkas malbono.

**Botistoj – kutima insultaĵo en Rusio kontraŭ malbonaj kinomekanikistoj.*



Esperantigis

**Igorj Ĥomjakov
(Rusio)**



Eldonas Redakcio de ***Penseo***

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)

Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto,
Chongqing, 400023, Ĉinio

Retadreso: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuantojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de ***Penseo***, vin
turnu al www.elperno.cn/penlisto.htm

